

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1977 2

KULTURAJ KAJEROJ

1977 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

La ŝippereoj ĉe « Horn »

Leonardo de Vinĉi R. Lloancy

Gringo, nia petola Perua simio

La lando de reĝino Maud Z. Danovskaja

La floro de la pastro Tomaso M. Ferenc trad. I. Nagy

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Skrapado, frotado, balaado, farbado, murtapetado, jen la nunaj aktivaĵoj en la kastelo en tiu semajno de martofino. Kiel kutime la gipsisto, la elektristo, ktp, ankoraŭ ne estis fininta sian laboron, kiam estis jam tempo de purigado antaŭ la alveno de la « printempaj » aliĝintoj. Rapide taĉmento de sindonemuloj tapetis, farbis... Iom post iom tiu transformiĝanta parto de la kastelo fariĝis « loĝebla » por la multaj anoncitaj vizitantoj. Jes, multaj. Ĉar antaŭ tri semajnoj subite alfluis aliĝoj, tiom ke ni devis rifuzi kelkajn ĉefe por la dua parto de la semajno. Al la jam ĉeestantaj infanoj kaj plenkreskuloj tiam aldoniĝos kvindek italaj gesamideanoj. La kastelo estos plenplena.

Ĉu tia ĝi estos dum la somero ? Ni ankoraŭ ne scias sed jam, fine de marto, restas tre malmulte da liberaj litoj por la unua periodo, kaj la informpetoj pri la aliaj periodoj alvenas kontentige. Ni rememorigas, ke originala praktika kurso okazos dum tiuj periodoj : ĉiu lernanto laboros ne nur laŭ sia propra ritmo sed ankaŭ surbaze de la nivelo de siaj konoj kaj de siaj lernospertoj. Tio estas interesa provo. Plie, dum la dua periodo la porkomencanta kurso estos gvidata de S-ino Childs-Mee laŭ Cseh-metodo. Tia kurso certe allogos ne nur lernantojn sed ankaŭ esperanto-instruantojn.

Pri la ekskursoj ni antaŭvidas kelkajn ŝanĝojn kaj aldonaĵojn ĉar la regulaj vizitantoj jam havis la okazon admiri la regionon aŭ partopreni la « klasikajn » promenadojn. Ni proponos ekskurson al Saint-Malo, urbo de la korsaroj, kaj vizito de la elektrejo funkcianta per tajdo-energio. Ni eble povos iri al Nantes, al aliaj lokoj ne tre konataj. Jen do, pliaj kialoj por viziti la Kulturdomon. Ĝis baldaŭ !

LA MUELEJOJ DE LA METILERNANTOJ

« La Muelejoj de metilernantoj » — internacia asocio de la junularo — kaj espereble internacia vilaĝo, festis la Kristnaskan feston. De la 24-a ĝis la 31-a de decembro, 40 geamikoj vivis ĉe ni goje kaj amike.

La venonta renkontiĝo okazos de la 16 a de Julio ĝis la 8 a de Aŭgusto, kun ĉeesto de 10 hungaraj esperantistoj, en la kadro de internacia « laborejo ».

Interesuloj anoncu sin al :

Moulin des Apprentis — 23220 BONNAT (Creuse)

Esperanto tra la Mondo

Ankoraŭ pliaj someraj renkontiĝoj

— 6a Varia Internacia Semajno, en Budapeŝto, kun ekskurso al Szeged, ktp..., 16-21a de Aŭgusto. Adreso : BTK ; Pf153, H-1443 Budapeŝto, Hungario.

— Semajno en « Slovaka Paradizo», Sp. Nova Ves (Ĉekoslovakio), 13-19a de Aŭgusto. Informas P. Pavuk Konradova 618, CS 05201 Sp. Nova Ves.

— Renkonto por Naturamikoj en Abaliget, apud Pecs (Hungario), 10-19a de Julio. Informas : TK de Hungara E.-Asocio, Pf2, H-7601 Pecs, Hungario.

— Pedagogia Esperanto-Seminario, en la bela esperanto-kampadejo de Primoŝten (Jugoslavio, ĉe Adriatiko), 6-22a de Julio. Kursoj por komencantoj, progresantoj, instruantoj. Skribu al Kroatia Esperanto-Ligo, YU-41001 Pf. 703, Zagreb.

— Dum la universala kongreso de Rejkjavik, okazos speciala seminario por la instruistoj de Esperanto laŭ la metodo Cseh. Profesorino : S-ino Haudebine, verŝajne. Skribi al Internacia-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag — 2011, Nederlando.

(Grandaj listoj de renkontoj, kongresoj aperis en « Esperanto », kaj « Heroldo »).

Novaj eldonaĵoj

— Aperos en Junio la mondfama klasikaĵo de la hispana literaturo « Don Quijote de la Mancha », en traduko de Fernando de Diego. Ĝi ampleksas 672 paĝojn kaj estas ilustrita kaj bindita.

— « Transe », originala romaneto de Lorjak, nova esperantista verkisto.

— « Kantoj kaj poemoj de Robert Burns ». Disko 30 cm duflanka, stereofona. Kantas M. Hill, deklamas W. Auld, sakfluto : Majoro W. Swinton.

— Sciencaj eldonaĵoj de « Someraj Universitataj Kursoj » ; « Enkonduko en la teorian biologon » kaj « Nocioj pri ornitologio ».

— « Primico », poemaro de Robindronath Tagor, tradukita de juna bengala lingvisto Probal Daŝgupto.

— « Epifanio, aŭ kiel vi volas » de W. Shakespeare, tradukita de W. Auld.

— « Sciencaj komunikaĵoj » (12 studoj pri diversciencaj temoj, el Budapeŝto).

— « Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro » de Roger Bernard.

Aŭtuna renkonto en Bulgario

Legantino de « Kulturaj Kajeroj », F-ino Bois, atentigis nin pri la allogeco de aŭtunaj renkontoj aranĝitaj en Velingrad (Bulgario). Tiujare : 18.9 — 2.10. Adreso : S-ro Manol Ĉolev, str. Bratja Kraŝtini 14, 4600 Velingrad, Bulgario. F-ino A. Bois, « Le Breil », La Gouesniere, 35350 St-Méloir-des-Ondes estas preta doni ampleksajn informojn.

En Radio-Vatican

Ĉiudimanĉe vespere, estas nun dissendo en Esperanto en Radio-Vatican 20,05 — 20,15 laŭ la horsistemo de Greenwich), sur 41m., 48,5m., 196m.

Se vi bone konas la prisportajn vortojn...

Se vi povas helpi por la redaktado de seplingva sporta terminaro en la jenaj lingvoj : germana, franca, angla, rusa, hispana, hungara, esperanta, rilatu kun S-ro T. Ujlaky-Nagy, Varsarhelyi P.u. 12, h — 1114 Budapest, Hungario.

Internacia konferenco por instruistoj en Luksemburgo

La 11a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos de la 14a ĝis la 24a de Julio en Luksemburgo. Temo : « Kultura valoro de Esperanto ». Loko : hotelo « Holiday Inn ». Informas A. Winkler, 1, rue de Kehlen, Olm, Luksemburgo.

Somera Esperanto - Universitato en Hungario

Por la 15a fojo, tia universitato okazos en Gula (Hungario) de la 3a ĝis la 9a de Julio, kun plurlandaj prelegistoj : Okazos ankaŭ lingvo-ekzamenoj kaj ekskursoj Adreso : S.E.U., 48-as u. 11, Tit, H-5700 Gyula, Hungario.

La antaŭkongreso en Skotlando

Ĝi okazos en Stirling (Skotlando) de la 26a ĝis la 29a de Julio, kun la temo : « Esperanta kaj skota kulturoj ». Adreso : S-ro W. Auld, 20, Harviestown Road, Dollar, Claks, Skotlando FK147HG, Britio.

La Esperantistaj matematikistoj

Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (Adreso S-ro F. Lo Jacomo, 14, rue de la Pompe, 75016 Paris, Francio) eldonas fakan revuon : « Matematiko translimen ».

La agado de la asocio dividiĝas en 13 agadkampoj. Krom la ekkonatiĝo de la esperantistaj matematikistoj, la asocio celas estigi unuecan matematikan terminologion en Esperanto, verki aŭ traduki en Esperanto matematikajn problemojn aŭ artikolojn, interesiĝi pri la instruado de matematiko en la diversaj landoj.

Esperanto-kurso en la studentaj radio-stacioj de britaj universitatoj

Sekve de taŭga agado de la brita esperantista « Grupo Kvin », kiu speciale agadas por enpenetrigi la internacian lingvon en radion kaj televidon, pluraj studentaj radiostacioj de britaj universitatoj decidis dissaŭdigi esperanto-kurson, dotitan de premio. La kurso estis ankaŭ registrata sur kasetbendoj por lingvolaboratorioj, aŭdvidaj bibliotekoj, klasoj, memstudado. Petoj jam alvenis por eldonado en aliaj lingvoj. Adreso : « Grupo Kvin », 30 Cambridge Road, Teddington, Middlesex, Britio.

Someraj kursoj en usonaj universitatoj...

Krom la regulaj esperanto-kursoj, gvidataj ĉiujare de W. Auld en la ŝtata universitato de San Francisko (dum Julio), oni anoncas por 1977 similan aranĝon, dum Junio, en Ĉikago. La kursoj estos organizitaj de la Universitato Loyola. Oni eĉ planas paralelan kurson por infanoj 6-12 jaraj.

... kaj novaĵoj el aliaj universitatoj

— Oni organizas Esperanto-kursojn en la universitato de Potchefstroom (Sud-Afriko) kaj en Lublin (Pollando), en la katolika universitato.

— En Sovet-Unio, la baŝkira universitato en la urbo Ufa enkondukis specialan kurson (oficialan) pri interlingvistiko kaj Esperanto.

LA ŜIPPEREOJ ĈE "HORN"

Inter la komunumoj Nes kaj Lôn kuŝas iom alta montarĉeno el la ĉefa monta regiono ĝis la maro. Ĝia orienta rando finiĝas per grandega strange formita rokpinto nomata Vesturhorn (okcidenta korno). El la sudokcidenta rando de tiu montarĉeno etendiĝas malalta rokdorso kaj la ekstremo de ĝi estas konuse forma rokpinto nomata Litlahorn (malgranda korno). Sed iom pli ol dudek kilometrojn nordoriente de Vesturhorn kuŝas alia montarĉeno el la monta regiono inter la komunumoj Lôn (laguno) kaj Alftafjörour (fjordo de cignoj). Tiu montarĉeno finiĝas per rokpinto, kiu el malproksime multe similas al Litlahorn. Ĝi nomiĝas Austurhorn (orienta korno). Inter Austurhorn kaj Vesturhorn estas la komunumo Lôn, sed la komunumo Nes (terlangoj) aŭ Hornafjörour (fjordo de la kornoj) estas okcidente de Vesturhorn. Sude de Vesturhorn kaj Litlahorn la bordo iom etendiĝas en la maron rekte de Litlahorn, kaj la fino de tiu terlango nomiĝas **Stokksnes**. Sed malsupre de la montfino en ioma duoncirklo inter Vesturhorn kaj Litlahorn staras la biendomoj de la bieno Horn en la komunumo Nes.

La domoj staras proksime al la maro, tiel ke estas nur iom pli ol unu kilometro ĝis tiel nomata Hornsvîk (golfeto de Horn). Sed ĝis la fino de Stokksnes, kiu limigas la okcidentan konturon de la golfeto, estas iomete pli ol du kilometroj. Ĉe Strokksnes estas amaso da rifoj, kaj tie estas danĝere ŝipveturi, kiam ŝtormas el sudo.

Nordoriente de Hornsvîk, proksimume du kilometrojn oriente de la biendomoj, sabla anguleto streĉas sin en rokan terlangon, kiu limigas la golfeton oriente. Ĝi kutime nomiĝas Hornshöfn (haveno de Horn). En antaŭaj jarcentoj estis tie loko por multaj fiŝkaptistoj el la komunumo Nes. Kaj ankaŭ fiŝkaptistoj de la norda parto de Islando restis tie por fiŝkapti. Ĉstas ankoraŭ videblaj multaj domruinoj ĉe la deklivo supre de la golfeto.

Preskaŭ dekunu kilometrojn okcidente de Stokksnes estas Hornafjaroarôs (elfluejo de la granda laguno Hornafjörour). Tie ĉeborde estas kelkloke rifoj. Preskaŭ sep kilometrojn nord-oriente de Stokksnes estas Papôs en la komunumo Lôn. (Papôs ankaŭ estas elfluejo de laguno) Inter Papôs kaj Hornsvîk estas en longa spaco pendo krutaj rampfalaĵoj, la tiel nomataj **Hornsskriour**. Supre de tiuj « rampfalaĵoj » tronas Vesturhorn, blanke griza kaj pratempe aspektanta, sed malsupre furiozas la maro sur rokoj kaj rifoj. Tiu pejzaĝo estas tre dezerta kaj mirinde grandtrajta.

La bieno Horn tial staras en tre soleca kaj izolita loko. Al plej proksima bieno oriente de la montoj, kiu estas Syorifjörour en Lôn, estas ĉirkaŭ ok kilometroj. Tiam oni pene transpaŝas **Hornsskriour.** Tiu vojaĝo ofte estas danĝera vintre. Piedirantoj tamen kelkfoje mallongigas la vojon per irado trans la monton. Tiuokaze oni iras norde de Vesturhorn, rekte supren de la bieno, trans montkolon nomatan Kex kaj malsupren laŭ valeto (Kastârdalur), kiu streĉas sin en la monton oriente, mallonge sude de la bieno Syori-Fjörour. Sed al la plej proksima bieno okcidente de Horn (al la bieno Binganes) estas dek kilometroj. Tiu vojo iras laŭ la okcidenta flanko de la montoĉeno, inter tiu kaj Skarosfjörour, kiu esence estas orienta parto de Hornafjörour kaj estas laguno kiel ĝi. Ĉi tiu vojo estas ne facile irebla pro ŝlimaj marĉoj kaj rokoplena pejzaĝo.



En tiu tempo kiam okazis la eventoj, kiuj nun estas priskribataj, estis kiel ankoraŭ hodiaŭ du bienoj en Horn. En unu loĝis la bienisto Sigurour Snjôlfsson, sed en la alia loĝis Eyjolfur Sigurôsson. Li estis ĉarpentisto. Tiun metion li lernis ĉe Georg Ahrenz, germana ĉarpentisto en Rejkjavik. Poste Eyjôlfur vojaĝis al Kopenhago kaj kunlaboris tie je domkonstruado dum du jaroj kaj duono. Post tio li revojagis al Islando kaj iom pli poste li edziĝis kaj fariĝis bienisto en Horn. Inter liaj gefiloj estis Sigurour bienisto en Horn kaj Stefan, kiu translogiĝis al Kopenhago, lernis tie tipografion kaj ankaŭ lernis multajn eksterlandajn lingvojn. Eyjôlfur mortis la 25-an de februaro 1904 en sia sepdek kvara jaro.

— ◎ — ◎ — ◎ — ◎ —

Jaŭde la 6-an de marto en la jaro 1873 la vetero estis tia ĉe la sudorienta bordo de Islando, ke la ĉielo estis plennuba, kaj milda orienta venteto blovis frue en la tago. Sed posttagmeze la vento ŝanĝiĝis al sudoriento kun densa neĝfalado. Jus antaŭ noktomezo ekfuriozis tempesto de sudo aŭ sudoriento kune kun pluvego kaj estis tiel mallume, ke apenaŭ estis distingebla ĉielo de tero, luno estis nur sep-nokta.

En tiu tago oni vidis de Horn multajn, francajn velŝipojn, tiam jus venintajn al Islando. Ili ĉiuj dise fiŝkaptis proksime al la marbordo kaj lasis sin drivi okcidenten laŭ la bordo kaŭze de la orienta venteto. Posttagmeze mallumiĝis ĉie ĉirkaŭe, tiel ke la tuta ŝiparo malaperis pro la densa neĝfalado.

La posta novaĵo estis, ke kiam bienuloj en Horn ellitiĝis je la oka horo matene la sepan de marto en dolĉa degela venteto de sudo, tiam ili vidas aron de viroj, kiui venas piedirante el direkto de Litlahorn al la bieno. Tie estis venantaj 18 ŝiprompiĝuloj de franca fiŝojaĥto kiu estis drivita marborden en la nokta tempesto mallonge okcidente de Stokksnes. Tiuj ĉi viroj estis gajaj kaj babilemaj, kaj unu el ili ankaŭ portis bareleton de konjako surdorse. Oni regalis kaj flegis ilin en Horn. La loĝdomom de Eyjôlfur oni malplenigis kiel loĝejo por ili. Kelkaj kuŝis en la litoj de la hejmanoj, sed por la aliaj estis aranĝitaj kuŝloko sur la planko per fojno, kiun Eyjôlfur alportis.

Pli poste en tiu tago ili ĉiuj iris en la ŝipon por savi manĝaĵojn kaj vestojn. Ili trovis iom da porkaĵo, pano kaj diversajn aliajn objektojn. Jus antaŭ vespero ili revenis al Horn, kaj tiam venis kune kun ili 13 aliaj ŝiprompiĝuloj. Du el ili estis el la sama ŝipo, kiel la 18, kiuj venis matene, sed 11 estis el alia ŝipo.

Tamen oni opiniis, ke unu el tiuj 11 apartenis al tria ŝipanaro, kaj oni supozis, ke li estis onde ŝoviĝinta surborden de skuno, kiu estis rompiĝinta sur rifoj proksime de la bordo oriente de Hornafjaroarôs. Ĉi tion oni divenis de tio, ke li estis eksterstaranto de la grupo kaj ofte iris sola okcidenten sur la bordon oriente de Hornafjaroarôs. Dekdu de tiuj 13, kiuj aldoniĝis al la grupo antaŭe veninta ekhavis loĝejon en biendomo de Eyjôlfur kune kun la aliaj. Sed unu estis grave vundita interne sur la tibikarno kaj estis enlitigata kun la hejmanoj en loĝdomo de Sigurour. Unu alia ankaŭ estis grave vundita, sed li devis loĝi kun siaj kamaradoj en loĝdomo de Eyjôlfur.


Hejme en Horn oni ankoraŭ malmulte sciis pri tio kio okazis tiun ŝtormegan nokton. Sed baldaŭ konatiĝis, ke en tiu subita tempesto de sudo pereis kvin francaj fiŝkaptaj ŝipoj, kvar skunoj kaj unu lugro proksime le Stokksnes. Unu ĵetiĝis marborden mallonge okcidente de Stokksnes, antaŭe menciate. Ĝi nomiĝis « Fleur de Marie » kaj estis de Paimpol. De ĝi saviĝis 20 homoj, sed tri pereis. La dua ŝipo grondis okcidente meze sur Hornsfjörur (marbordoj de Horn). Ĝia nomo estis « L'Oiseau de mer ». De ĝi saviĝis 10 aŭ 11 viroj, sed 12 aŭ 13 pereis. La tria ŝipo rompiĝis oriente de Hornafjaroarôs, kiel antaŭe menciate. Oni supozis, ke verŝajne unu homo el ĝi saviĝis. La kvara ŝipo rompiĝis sur rifo okcidente de Stokksnes. Ĝi disŝiriĝis laŭlonge sur la rifo.

Unu duono pendis pere de la ankro sur la rifo ĝis ĝi dispeciĝis en la ondrompaĵo. La kvina ŝipo probable drivis alborden en Hornsvjk oriente de la bieno aŭ rompiĝis sur rifoj proksime de Papôs. Ĉiuj ŝipanoj de tiuj du ŝipoj pereis. Tiuj tri laste nomitaj ŝipoj nomiĝis **Notre Dame des Dunes** de Paimpol, **L'Express** kaj **Marie Josephine.** Maljunaj homoj en la distrikto Skaftafellssysla diras, ke laŭ onidiro 13 aŭ 14 ŝipoj pereis tiun nokton ĉe marbordo de Skaftafellssyla.

Ĉiuj ŝipestroj de tiuj velŝipoj pereis escepte la ŝipestro de **Fleur de Marie.** Li sukcesis veni surborden vivanta kune kun ŝiaj ŝipanoj, kiam ili forlasis la ŝipon. Tie li forsalutis siajn kamaradojn. Li diris, ke li nek havas edzinon nek infanojn, sed ĉi nun estas ke li suferas ŝiprompiĝon la trian fojon. Tiel dirinte li reiris sur la ŝipon, sed la aliaj ekiris por serĉi loĝejon. Pli malfrue en tiu tago ili trovis lin mortintan sur la ferdeko de la ŝipo. Oni opiniis, ke li englutis venenon ĉar neniuj vundoj estis videblaj sur la kadavro. Tiu ŝipo kuŝis sendifekta sur plataj rokoj ĝis venonta alfluo, tiel ke oni povis sekpiede eniri ĝin. Sed je alfluo ĝi ekmalligiĝis kaj rompiĝis.

Inter tiuj 10 aŭ 11, kiuj saviĝis el **L'Oiseau de mer** estis la subŝipestro. Li tiel rakontis, ke je la dekunua horo la tempestan nokton ili estis proksime al **Ingôlfshöfoi** (promontoro de Ingôlfur). (Ingôlfur estis la unua ekloĝanto de Islando en jaro 874).

(daurigota).



LEONARDO DE VINĈI

GENIO UNIVERSALA

Por multaj tiu nomo elvokas la genian pentriston de la brila itala Renesanco, aŭtoron de la mondrenoma Ĝiokonda kaj de la Sankta Manĝo en Milano. Tamen, Leonardo estis tiu elstara pentristo, sed ankaŭ genia teknikisto, kiu interesiĝis pri horloĝfarado, konstruado de pontoj kaj de militistaj instalaĵoj, konceptado de strategiaj maŝinoj. Pentristo, teknikisto, militista inĝeniero, li scipovis ankaŭ muzikon, anatomion, botanikon, geografion, astronomion. Nun, nur dekon da liaj pentraĵoj, dise en la mondo, ni povas admiri ; kaj la plej granda parto de liaj restantaj manuskriptoj koncernas teknologion kaj inventadon de strangaj aparatoj : ŝraŭboj, dentradoj, risortoj, globlagroj, ĉenoj, k.t.p... Li eĉ inventis procedon por reflosigi subakvigitajn ŝipojn, daŭre uzatan.

LEONARDO LA FLORENCANO

Leonardo naskiĝis la 15an de aprilo 1452 en Vinĉi, vilaĝo tridek kilometrojn apud Florenco. Lia patro notario jam de pluraj generacioj, apartenis al provinca nobelaro. Pri lia junaĝon oni tre malmulton scias. Sendube lia edukado estis simila al tiu de la samtempaj junaj filoj de la sama medio. Oni tamen devas ne forgesi ke, tiuepoke, pentrado estis konsiderata kiel mana laboro senprestiĝa, malpli valora ol liberala profesio. Kial la patro ne malaprobis tiun inklinon al pentrado rilate sian filon ? Ĉu pro la fakto ke Leonardo estis lia bastardo ? Aŭ ĉar tiu, sufiĉe juna, montris siajn talentajn kapablojn ? Tamen, ĝis la 21a jaro oni ne konas produktaĵojn de tiuj kapablecoj.

Je lia 16a jaro, la familio translokiĝis en Florencon. Tie, la juna adoleskanto vivas meze de la plej brila periodo kaj en la plej geniriĉa urbo de la itala Renesanco. Florencon estras la familio de Mediĉi kiu, krom la milita potenco, kaj la ekonomia monopolo ankaŭ kuraĝigas kaj favoras ĉiuspecajn artistojn, filozofojn, pensulojn, sciencistojn. Tie vivos kaj disradios Makiavelo, Piko de Mirandola, Savonarolo, Mikelanĝelo, Rafaelo. Tie ankaŭ, Marsilio Fiĉino estas stariginta Akademion, laŭ la modelo de la antikva greka filozofo Platono. En Florenco, la juna Leonardo studas pentrarton subgvide de Verokio ; liaj samlernantoj estas Botiĉeli kaj Peruĝino.

Se Florenco, dank'al la klera impulso de ĝia gvidanto, iĝis la centro de la renesanca kulturo, ankaŭ en la cetero de Italio sentiĝas tia influo ; kaj, en aliajn partojn de Eŭropo « venas nova sento per flugiloj de facila vento ». En Pollando, Koperniko renversas la astronomian universon, kaj en Germanujo, Lutero dispartigas la kristanan kredon, dum Nova Kontinento ekaperas trans la oceano. Ĉie novaj ideoj, novaj celoj aperas kaj ekfloras ; nova mondbildo envenas en ĉiujn mensojn, ankaŭ precipe en tiun de Leonardo. Ne estas strange, do, se ni trovas en li, kuniĝon de fantazio kaj de pacienca serĉado, geniajn trajtojn kaj grandegan ĉioscian apetiton en ĉiuj kampoj de la homa scivolemo. Li estas la plej tipa reprezentanto de tiu arda periodo.

En 1482, Leonardo vojaĝas al Milano kiel honorsendito de Lorenco de Mediĉi al la tiea potenca fa-



milio Sforza. Nia artisto-inĝeniero restados en Milano ĝis 1499, li amikiĝos kun Bramante.

Poste li vojaĝos en Italio. Ĝis 1508 li alterne ĉeestas en Florenco kaj en Milano. De 1508 ĝis 1513, li vivas en Milano ; poste, ĝis 1516, en Romo. Fine de tiu lasta jaro li vojaĝas al Francujo, vokite de la franca reĝo : Francisko la Unua. Li restos en tiu lando ĝis sia morto, en 1519, en sia kastelo en Amboise, kie oni lin entombigis, laŭ siaj lastaj voloj, en la preĝejo Sankta Florenteno.

ĈU MALKLERULO ?

Kion diri pri la viro mem ? Mistera aŭreolo ĉirkaŭas lin. Por ni, li aperas kiel genia kaj universala homo kiu tuŝis ĉiujn fakojn, kaj kies konoj superstaras. Tamen Leonardo mem plendas pri siaj mankoj : « Mi bone scias ke, ĉar mi ne estas beletristo, kelkaj arogantuloj pensos, ke ili prave povos min mallaŭdi, dirante ke mi estas viro malklera. Stultuloj !... Ili diros ke, ne havante beletran scion, mi ne povas bone diri tion kion mi volas diri. Nu, ili ne scias ke miaj konoj rezultas pli el eksperimento ol el aliesaj paroloj ».

Mankojn li ja havis. Li apenaŭ scipovis la latinan lingvon, kiun li lernis per si mem, estante 40 jara. Miriga fakto se oni prikonsideras la epokon, kiam tiu lingvo estis vere universala. Li ĉiam uzis la popularan lingvon, tiun de Dante. Pri la latina, siajn mankojn rilate la gramatikon kaj la vorttrezoron li kompensis per vortoj kiujn li listigis kaj parkerigis.

Liaj konoj pri matematiko estis eksterordinare malgrandaj, precipe pri aritmetiko kaj ordinara kalkulo ; adiciante simplajn ciferojn, li eraras. Pri algebro kaj trigonometrio li nenion scias. Li kuraĝe klopodis ŝtopi siajn mankojn sur tiu ĉi kampo ĉirkaŭ la 50a jaro. Tamen, rilate geometrion, li estis vere kapabla.

Ni eĉ povas diri ke lia penso disvolviĝis laŭ geometriaj skemoj. Ofte, sur liaj manuskriptoj, dise aperas figuroj, kiam vortoj mankas por traduki la pensojn. Por Leonardo, geometrio estas konkretigo de abstraktaj ideoj ; demonstro estas, antaŭ ĉio, plensence, elmontro.

Li ankaŭ ŝatis eksperimenti, por ĉiam resti en kontakto kun la konkretaj aĵoj. Per tiu sinteno, li viciĝas inter la unuaj modernuloj kaj, tutcerte, povas patri Galileon aŭ Newton-n. « Mia intenco, li diris, estas unue alvoki la eksperimenton kaj poste, pere de racio, demonstri kial tia eksperimento devige tiele

procedas ». Leonardo ne ŝatis la apriorajn asertojn kaj strebis por forigi ĉiajn dogmismojn.

Tiu geometria inklino kunplektita kun la eksperimenta metodo prilumigas du direktojn en la interesoj de Leonardo : la pentrarton, kaj la konceptadon de teknologiaj sistemoj, ĉu militistaj, ĉu artaj (Muzikinstrumentoj, fandado de statuoj), ĉu ordinaraj.

ARTISTO DUM PACPERIODOJ

Tiu lasta punkto estas sendube la plej interesa kaj la plej kapabla por riveli la geniajn trajtojn de la eminenta karaktero de nia Renesanculo.

Pri muziko, oni ofte preteratentas, ke Leonardo alte taksis tiun arton, kaj ke li instruis ĝin dum pluraj jaroj. Lia granda plezuro estis prilabori novajn instrumentojn, kiel tiun liron per kiu li ludis antaŭ la grafo Sforza en Milano, aŭ tiun aŭtomatan tamburon kie 5 artikitaj frapiloj ricevas sinsekvan impulson de dentradoj, tiuj mem ricevante movon de duradoj per kiuj oni ruligas la instrumenton. La plej stranga aparato, de li konceptita, estas tiu « viola organista », kombino de orgeno, dank'al klavaro, kaj de violono, dank'al kordoj ; tiujn frotas arĉo, kiu havas movon kontinuan, kaj ne alternan, kiel en la violono. Rilate nian modernan violonon, la specialistoj emas opinii ke Leonardo partoprenis en ties konceptado.

Pri militistaj instalaĵoj, oni povas konjekti ke ili estis la ĉefa zorgo kaj la glortitolo de la Florencano. En tiu epoko, milito ŝvebis en ĉiuj aeroj. En la dungpeto kiun li sendas al la grafo Sforza, el ties delalineoj, naŭ rilatas militistajn aferojn. Iel strange por ni, nur la lasta tekstas : « Dum pacperiodoj, mi opinias ke mi kontentigos kaj egalos iun ajn en arkitekturo, en la konstruado de ejoj privataj aŭ publikaj... Same, mi povas skulpti el marmoro, el bronzo ; kaj rilate la pentrarton, mi povas, prilabori ĉion eblan, same bone kiel iu alia, kiu ajn li estus ». Tamen, malgraŭ tiu laŭda aludo pri siaj kapabloj koncerne militajn aferojn, Leonardo ne ŝatis militon, kiun li severe taksas dirante ke ĝis estas : « besta frenezo ».


Abundas en liaj manuskriptoj la priskriboj kaj la skemoj de militistaj iloj : li konceptas aŭtomatan mitralon, kaj artilerimaŝinon orgenaspektan. Li imagas « la plej mortigan maŝinon » : la grenadon. En tiaj okazoj, li zorgas pri rapideco de elfrapado precizeco, kaj granda efikeco. Ni ne forgesu ke li vivis en ŝtorma epoko, dum kiu ĉiutagas milito. Cetere, leginte Makiavelon, li konsideris militon kiel necesan malbonon.

MIRINDA TEKNIKISTO

Rilate la ordinarajn objektojn, lian atenton kaptas la faciligado de la vivo, kio ja estas la esenca trajto de tekniko. Li desegnas horloĝojn insistante pri la mekanismoj de la movo donantaj risortoj, kaj pri la regulatoroj kiuj uniformigas la movon. En unu el liaj desegnoj vidiĝas tia regulatoro, kiu celas tiktaki silente. Notinde estas, ke similan mekanismon oni « inventis » dum la lasta mondmilito por prokrasti la eksplodon de minoj, nur poste oni adaptis tiun aparaton al la horloĝfarado.

Pro la intereso pri la flugo de la birdoj kiujn Leonardo atente observadas, li imagas aparatojn por ebligi la flugadon de la homo. Foje, tiuj maŝinoj havas alojn similajn al birdflugiloj, kiel la unuaj flugmaŝinoj de nia epoko ; foje, ankaŭ, la maŝino de Leonardo havas helicon laŭ aspekto de niaj modernaj helikopteroj. Tamen, oni ne devas iluziiĝi : eĉ se Leonardo konceptis tiajn aparatojn, li ne suspektis ke mankos al li la ĉefa afero : la energipotenco por flugigi ilin. Li pensis ke nur per la homforto li povos ebligi la ŝvebadon.

La plej stranga kuriozaĵo kiun oni povas ĉerpi el la manuskriptoj de la Florencano estas la desegno de biciklo, kies du pedaloj donas movon al la malantaŭa rado pere de artikigita ĉeno kaj du dentradoj, unu granda, la alia malpli granda. Tiu instrumento tre similas al niaj modernaj bicikloj. Se oni volas havi ideon pri la genio de Leonardo, sufiĉas vicigi bildojn de la evoluhistorio de la biciklo por konstati ke nur en 1900 la « modernuloj » alproksimiĝis al la ideo de la genia desegnisto.



ELSTARA ARTISTO

Plej strange, pri arto mem, kvankam oni multon povas diri, tamen ĝi estas la kampo kie malplej multe da verkoj liaj restas. Kiel dirite pri pentraĵoj, nun tempe postrestas nur kelkdeko da vere aŭtentikaj verkoj, sed ĉiuj estas ja grandiozaj.

Rilate skulptaĵojn, oni ne certas, ĉu li mem kreis. Sed ĉar li lernis en la ateliero de Verokio, konata skulptisto, oni ŝajne povas konjekti, ke li partoprenis en kelkaj verkoj. Oni ankaŭ scias ke lia plej granda artprojekto estis kolosa bronza rajdanto, honore al grafo Sforza. Tiu statuo devus superi ĉiujn de li konatajn similaĵojn. Ĝi devus estis duoble pri alta ol la antikva bronzaĵo pri Marko-Aŭrelio staranta sur kapitolo. Dum jardeko, Leonardo imagis novajn procedojn por fandi tian kolosan verkon ; plurfoje li ŝangis la sintenon de la ĉevalo. Bedaŭrinde, pro la multega bezonata maso da bronzo, kaj pro ŝanĝo en la politikaj cirkonstancoj, li neniam povis finpretigi tiun ĉefverkon. Prefere oni uzis la bronzon por fabrikado de kanonoj ; ĉiam la eterna dramo : kanono kontraŭ kulturo.

Koncerne la pentraĵojn, necesas diri ke Leonardo tre malrapide pentris. Li bezonis plurajn jarojn por polurigi siajn verkojn. La duonridetanta vizaĝo de la Ĝiokonda postulis kvar jarojn. Li emis prilabori multajn verkojn samtempe, aldonante detalojn, korektante malgrandajn erojn. Antaŭ la efektivigo de pentraĵo, li longe pretigis la temon, desegnante plurfoje la personojn ; li longe studadis la sintenon kaj la vizaĝmienon. Liaj skizoj pri unu sama temo abundas. Ŝajnas ke li ne fidis la unuan inspiron, li ĉiam strebis por pli da perfekteco.

Lia glortitolo sendube estas la reprezento de la Lasta Manĝo de Kristo kun la 12 Apostoloj. Tiun freskon li pentris en la manĝejo de la monakejo Sankta Maria de La Gracoj en Milano. En tiu verko, la perspektivo ne nur enkadriĝas en la bildo mem, sed en la tuta ĉirkaŭaĵo de la manĝejo. La centro de la perspektivaj linioj kunradias en la vizaĝon de Jesuo kiu bone reliefiĝas, dank'al, malantaŭ li, malfermita fenestro ; ankaŭ la lumo kiu prilumas la pentraĵon ŝajnas elveni el la fenestroj de la manĝejo. La artisto celis reprezenti la ekon de la paroloj de Jesuo, ĵus anoncinta ke, inter la 12 ĉeestantoj, unu lin perfidos. Per sia Kreo-povo, la artisto sukcesis doni al ĉiu persono apartan sintenon kaj mienon, sekve al la ĵus prononcitaj paroloj. Oni havas impreson ke haltiĝis la tempofluo, kaj ŝtoniĝis la ekmovoj de la homaj pasioj. Kontraste kun la moviĝantaj apostoloj, Jesuo aperas serena, paca, senpasia. Pli ol ĉio alia, tiu fresko famigis la nomon de Leonardo.

Jen do, rapide skizitaj, la vivo kaj la faroj de tiu fama, inter la plej famaj, viro. Eĉ se mi preterlasis multajn sciindaĵojn, konsolinde estas ke, pri tiela eminentulo, oni neniam sukcesas ĉirkaŭigi la multfacetan personecon, kaj oni ĉiam povas esperi malkovri novajn kapablojn. Du kuriozaĵoj restas. La unua estas ke Leonardo estis maldekstrulo, li neniam uzis la dekstran manon, nek por skribi, nek por pentri aŭ desegni. La dua estas ke li ĉiam skribis laŭ la t. n. « spegula skribo », t. e. renversita skribo, de dekstre maldektren. Por ĝin legi oni bezonas uzi spegulon.

R. Lloancy.

BIBLIOGRAFIO :

1) LEONARD DEVINCI - L'HUMANISTE - L'ARTISTE - L'INVENTEUR - LADISLAO RETI R. LAFFONT - PARIS 1974.

2) LEONARD DE VINCI (2 dikegaj volumoj) EDITIONS ATLAS - PARIS 1975.

Gringo, nia petola Perua simio

Kun du malicetaj okuloj brilantaj en inteligenta kapo, kiun heligis vico da blankaj dentoj — kun supla, nerva korpo kovrita je brun-rufa felo kaj kvazaŭ kapvestita de stranga nigra vertoĉapo — jen kiel Gringo aperis al mi dum ĝi alpremiĝis al la brusto de mia edzo ; lin ĝi firme ĉirkaŭvolvis per sia longa vosto, por ne riski perdi sian rifuĝejon.

Sendube kulpa je ia malsaĝaĵo, tiu beleta besto estis ricevinta de sia mastro, sur strato mem de Lima, tiel brutalan punfrapadon, ke mia edzo intervenis. La « Cholo » tuj proponis al li vendi sian simion kontraŭ konvena sumo ; la interŝanĝo okazis. Gringo tuj komprenis ke ĝi estis eskapinta el la kutimaj malbonaj perfortaĵoj kaj dediĉis al sia neatendita savinto senliman kaj senfinan dankemon ; kiam mia edzo alproksimiĝis, Gringo tuj forlasis ludojn kaj manĝojn kaj saltis sur liajn brakojn.

Senprokraste ni serĉis taŭgan lokon por nia eta pensionulo ; ni instalis ĝin en mallantaŭa korto, sub la ŝtuparo, kiu kondukis al la apartamento de la geservistoj ; ni fiksis ringo ĉe la muro por alkroĉi ĝian longan ĉenon ligitan al ĝia leda zono ; ĝi povis facile cirkuli en tiu ŝirmita spaco ; kontraŭ la freŝaj noktoj mi donis al ĝi larĝan kovrilon kaj ĉapeton ; obeeme Gringo akceptis, ke mi nodu ties rubandojn sub ĝia mentono.

La morgaŭan matenon, nia kuiristino Mercedesa plendis al mi, ke la simio « mokis ŝin ». Mi iris por kontroli kaj ne povis ne ekridegi ; la « Chola » — virinoj portas la « manta » — estas granda nigra vualo, kiu kovras la kapon, stringas la kolon kaj falas ĝis la genuoj ; Gringo estis vera bildigo de Mercedesa ; ĝi paradis kun pugno sur la kokso, perfekte imitante la ondan paŝadon de la kuiristino ; tamen, kvankam iom ofendita, ŝi ankaŭ amuziĝis je la komikaĵo de nia simieto ; poste iliaj rilatoj okazigis plej komikajn scenojn.

Ofte Mercedesa preparis bulojn je viando kaj rizo, kiujn ŝi vicigis sur longa tablo ; Gringo tre interesiĝis je ĉiuj ŝiaj gestoj ; tre frandema je rizo ĝi ĝemetis kaj plorpetis, kun la manoj etenditaj al ŝi, ĝis ŝi konsentis doni al ĝi rizoporcion ; tuj ĝi faris rizo-buletojn, kiujn ĝi zorge vicigis antaŭ si ; poste ĝi atendis, ke Mercedesa turnu la kapon al ĝi por ilin forĵeti plenvizaĝen ; ĉiufoje la kuiristino kuris al mi por plendi kontraŭ la simio ; kiam mi alvenis ĉe la tablo Gringo estis manĝinta sian tutan rizon kaj kviete sidanta, ŝajnigis ne kompreni miajn riproĉojn.

Gringo ne plu surmetis sian ĉapon, kiun ĝi uzis por pli serioza ludo ; ni havis dikan katon, Minu, kiu libere promenis dum Gringo restis enĉenigita ; per specialaj krioj nia simio sukcesis venigi la katon, kiu treniĝis kun malfeliĉa mieno ĝis Gringo ; tiu ĉi komencis eltiri kelkajn harojn el ĝia lipharo — sendube neestetika — ; poste ĝi metis la ĉapon sur la kapon de Minu kaj lerte nodis la rubandojn sub ĝia mentono ; ĝi devigis la katon resti sidanta kaj ŝajnigis ne plu atenti ĝin ; sed kiam Minu, lertkrure, provis eltiri unu el siaj oreloj el sub la ĉapo, Gringo rapide forte ambaŭvangen frapis ĝin kaj remetis la orelon sub la ĉapon ; dum pli ol unu semajno Minu portis tiun ĉapon ; poste Gringo forlasis tiun ludon sed ĉiam venigis la katon por eltiri ĝiajn lipharojn, kiuj denove kreskis.

Nia lakto-liveristo iĝis granda amiko de la simieto ; ĉiutage li donis al ĝi iom da lakto ; ĉiufoje Gringo ĝoje kriis kaj etendis al li petantajn manojn ; eĉ post kelka tempo ĝi sendis kisojn, kiujn ĝi sciis imiti, kiam ĝi forte deziris ion ; ĝi tre frandis fruktojn ; ĝi sciis rompi la frukto-ŝelon kaj elpreni la internan ŝeleton antaŭ ol krakmanĝi juglandojn, avelojn kaj ternuksojn.

Gringo estis tre scivolema ; kelkfoje tio helpis al ni ; kiam mia edzo lasis ĝin salti sur siajn brakojn, li ne plu povis liberiĝi, tiel forte la simieto ĉirkaŭvolvis sian voston ĉirkaŭ lia antaŭbrako ; sufiĉis eniri en apudan ĉambron kaj ĉi tie brueti ; tuj la besteto saltis teren kaj provis vidi kio okazis en tiu ĉambro ; malgraŭ ĝia malico kaj inteligenteco la ruzo ĉiam sukcesis.

Feliĉa en nia domo, certa pri bona nutraĵo kaj nia bonkoreco Gringo turnis sin al ludoj malpli naivaj. Kvankam ni provis diversajn fermilojn, ĝi sukcesis, dank'al siaj lertaj kaj fortaj fingrojn malagrafi sian ĉenon ; sed malice ĝi gardis la ĉenon sub sia piedo por ke ni nenion suspektu ; kiam ĝi sciis nin foririntaj ĝi eniris en la domon, malfermis la tirkestojn, ilin malplenigis kaj kunportis, en sian ejon, ĉion, kio brilis ; la skribejo de mia edzo pli speciale allogis ĝin ; iun tagon ĝi trempis sian manon en la inkujon kaj, por amuziĝi, makulis ĉiujn blankajn paperojn, kiujn ĝi trovis ; tuj kiam ĝi aŭdis nin Gringo haste reiris al sia loĝejo, kaj zorge tenante sian ĉenon, montris plej naivan mienon ; sed, ĉar ĝi antaŭe suferis multe pli terurajn punojn, ĝi tute ne atentis la vergon, per kiu mia edzo minacis ĝin, pli ol li batis ĝin.

Baldaŭ la maliceta Gringo kredis inventi bonan rimedon por eviti la batpunon ; ĝi kriis antaŭ ol esti batata kaj pli ol unu fojon ĝiaj trofruaj krioj informis nin, ke ĝi kulpis je ankoraŭ ne malkovrita kulpo.

Okaze de invito-kunveno dum multaj gastoj sidis ĉirkaŭ nia tablo, mi rimarkis, ke Gringo atente observis min tra la fenestro ; kiam mi antaŭenigis la manon al la frukt-korbo, ĝi akre kriegis ; kion ĝi estis farinta ? mi tuj komprenis : la fruktoj ŝajnis ne tuŝitaj, tamen ĉiuj banan-ŝeloj estis malplenaj sed zorge refermitaj ; la « chirimoyas » estas delica frukto, kiu similas verdan pomon kaj entenas bonegan pulpon ; ĉiuj estis malplenaj kaj relokitaj tiamaniere, ke ili ŝajnis tute sendifektaj ; ĉiuj niaj gastoj ekridegis kaj portis frandaĵojn al Gringo ; ĝi ne ricevis la merititan punon sed mia edzo rapide religis ĝian ĉenon por eviti, ke ĝi kaptu la juvelojn de niaj amikinoj.

Valora fingroringo estis malaperinta ; longtempe ni serĉis ĝin ; iun tagon sunradio briligis ion en la korto de la simio ; mi levprenis ŝtonon kaj malkovris la « trezoron » de Gringo, kiu grumblis por montri sian malkontentecon ; meze de vitro-kaj-porcelano-pecoj, de vivkoloraj ĉifonoj de oritaj ŝnuretoj troviĝis la fingroringo, kiun mi prenis ; post mia foriro, Gringo, ĉiam grumblante, ĉion kontrolis kaj reordigis.

La aŭdaco de Gringo iĝis pli kaj pli granda. Iun tagon, revenante hejmen, mi trovis ĝin furiozan kaj akre kriegantan : la kurtenoj estis ĉarpiigitaj, multaj paperoj pecigitaj, la vazoj renversitaj kaj la fiŝobokalo preskaŭ malplena ; ĝia ekscitiĝo estis tiel granda, ke mi rifuĝis kun la infanoj en sekura ĉambro, ĝis la reveno de mia edzo ; nur li povis ĝin obeigi ; tuj kiam ĝi aŭdis la paŝojn de sia mastro Gringo, plorĝemante kaj sendante plej tenerajn kisojn, ruliĝis piede de li ; sed ĉi-foje ĝi ricevis severan batpunon kaj ne rajtis salti sur la brakojn de sia mastro ; dum la tuta vespero ĝi montris malgajan kaj pentantan mienon.

La ĉeesto de la besteto inter ni pli kaj pli montriĝis neebla ; certe oni povus meti ĝin en kaĝon sed ĝi estus tro malfeliĉa. Ni pensis loki ĝin en la Zoologia Parko, ĉe la Granda Rotondo de la Simioj ; sed niaj infanoj montris tro da ĉagreno, kaj ni atendis ankoraŭ kelka tempo.

Iun posttagmezon lumeto altiris nin en la korton de Gringo ; ĝi estis amasiginta ĵurnalojn sub la ligna ŝtuparo, kaj ŝtelinte la alumet-skatolon de Mercedesa — kiun ĝi estis atente observinta — ĝi estis ekbruliginta la paperon kaj pro ĝojo dancis antaŭ la fajro.

Ĉifoje ni ne plu povis heziti ; kun trista koro, ni ĉiuj kune kondukis Gringo al la Rotondo de la Simioj. Ni pensis, ke ĝi estos feliĉa kun siaj samspeculoj ; sed apenaŭ enirinta en la grandan kaĝon ĝi ĵetegis sin ĉe la kradaĵon kaj etendis al ni siajn petantajn manojn ; ĉiun tagon ni vizitis ĝin kaj alportis ĝiajn preferatajn frandaĵojn ; ĉiufoje la sama sceno ripetiĝis : Gringo « sentis » nian alvenon longe antaŭ ol vidi nin kaj ni aŭdis ĝiajn ĝojkriojn ; vidante nin ĝi forpuŝis la aliajn simiojn, eĉ la pli dikajn ol ĝi ; ni donis al ĝi juglandojn, avelojn, sukeron, ĉion, kion ĝi multe ŝatis ; ĝi ordigis ĉion antaŭ si, nenion manĝante dum ni estis ĉi tie ; ĝi kontentiĝis adore rigardi nin, ĝoje krietante.

Post du jara deĵoro en Peruo, mia edzo devis reveni Francujon. Kun larmoj en la okuloj ni adiaŭis nian simieton.

Du monatojn post nia foriro,unu el niaj amikoj informis nin ke Gringo estis morta ; ĝi pli kaj pli malĝojiĝis, konsumiĝis kaj rifuzis manĝi.

La lando de reĝino Maud *

Novelo de ZORJA DANOVSKAJA

Verŝajne, ŝi estis bela, la reĝino, se tutan landon oni baptis laŭ ŝia nomo. Kial ŝi ne estu bela ? Ne ĉiuj ja reĝinoj estis tiom hidaj, kiel Elizabeto I.

Maud, verŝajne, estis alta kun blondaj haroj kaj bluaj okuloj : tiom bluaj, tiom profundaj, ke, longe rigardinte ilin, oni povis vidi propran koron. Verŝajne, ŝi havis sveltan talion kaj vermiljonajn lipojn, kvazaŭ matena suno. Verŝajne, laŭte susuris ŝiaj pompaj jupoj, broditaj per arĝento, kiam ŝi malsupreniris en ĝardenon laŭ malvarmaj ŝtupoj de sia palaco. Tie malsupre atendis ŝin la aŭdaca maristo. Li estis alta, nebela, kun malhela vente brunigita haŭto, kun grandaj manoj, maldelikataj pro peza marista vivo, salitaj per ĉiuoceanaj ventoj. Ĉirkaŭ lia kolo estis ligita silka tuko kun broditaj rozoj kaj ora monogramo.

Li rigardis en la okulojn de sia suverenino, kaj lia koro laŭte batis ie sub la gorĝo mem.

Kaj poste ree tremis la veloj sub vento, simile al flugiloj de gigantaj mevoj ; la ŝiprandojn furioze frapis la verdaj ondoj ; bruis uragano, rompante ŝipojn, kvazaŭ nuksoŝelojn. En la arda aero susuris palmoj per rigidaj folioj. Sunbrunigitaj indiĝenoj disbatis kokosnuksojn, kaj seka, arda aero de dezertoj — garmatano — pelis flokojn de ruĝa polvo laŭlonge de Gvinea bordo, kaj la sablo nube ŝvebis en horizonto.

Kaj poste denove iĝis malvarme. Ĉiele arĝentaj nuboj memorigis ion dolore konatan, senfine karan. Sed la vento ŝiris la velojn, kaj la ŝipo iris suden. Malproksime protrestis landoj de la indiĝenoj, la brulanta suda ĉielo. La horizonto estis tegata de blanka vualo. Kaj fine la deĵoranta vaĉano, kiu sidis supre en tradicia barelo, ekkriis : « Tero ! » La aŭdaca maristo, sufokiĝante pro feliĉo, pensis : « Mi donos al la lando nomon de mia reĝino. Eterne konservos la memoron pri ŝiaj bluaj okuloj la malvarmaj rokoj, kovritaj de neĝo ».

Laŭ la moro de ĉiuj vojaĝuloj oni surterigis botelon kun skribaĵo, metis ĉirkaŭe ŝtonojn, trinkis vinon el netuŝeblaj provizoj kaj ekkursis laŭ la returna vojo.

La maro kolere renkontis kuraĝajn navigantojn, ondoj transruliĝis la ferdekon. Kvazaŭ indignitaj dioj, ĉirkaŭe leviĝis blankaj abruptoj. La ŝipo estis portata malantaŭen al la glacioj de Antarktiko. Ĉe ĝiaj bordoj embuskis la ŝtormo, kaj la skuita ŝipo kun vunditaj flankoj en multaj lokoj kaj flikaĵoj estis ĵetata kontraŭ ŝtonoj.

Kaj neniu homo revenis hejmen, neniu rakontis pri la malproksima ŝipiro.

En skualo de popolaj ribeloj estis pereanta la ĉarma reĝino. La reĝinon oni ne kompatis. Ŝi estis subpremanto. Kiom valoras ŝia bonkoro ? Ŝia popolo vivis same malbone, kiel en aliaj reĝlandoj. Sed oni kompatis la virinon kun granda amo en la animo, belegan, kiel fabela floro de Afrikaj oazoj — lotoso, kiu havis malfeliĉon naskiĝi reĝino. « Aĥ ! Kial mi ne naskiĝis simpla kudristino ! » — verŝajne, pensis ŝi en sia lasta horo. Kaj tiam ŝi rememoris, eble, ventehardítan vizaĝon kaj ardajn tenerajn manojn kun kruda haŭto.

Kaj en glaciaj vastoj de l'Antarktiko por eterno restis la lando, portanta ŝian nomon. Hurlis la ventoj, tintis neĝoblovadoj, neeltenebla malvarmo descendis de l'senindulga griza ĉielo. Kaj, verŝajne, al homo, kiu post multaj jaroj surpasis la landon, ŝajnis almenaŭ strange, ke glacia malvarmo ne degelis pro flamo de l'koro, kiu portis sian senfinan amon tra la tuta planedo kaj senmortigis sian amatan.

... — Nomu novan kontinenton per mia nomo. Donacu al mi peceton de l'mondo. Donacu al mi almenaŭ etan insulon. Eĉ ĝi estu ne insulo, nur roko en Pacifiko !

Kial ŝi naskiĝis tiel malfrue ? En la XX jarcento ne restis blankaj makuloj sur la mapo. Longen kaj krucen estas esploritaj ĉiuj kontinentoj, malkovritaj ĉiuj insuloj. Ĉiuj rokoj, ĉiuj subakvaj rifoj estas metitaj sur la mapon. Sed Andreo ridas kaj diras, ke ŝi estas stranga, ke ĉio ĉi estas — infanaĵo. Kial do li ne komprenas ! Ŝi ja ne bezonas tiun teron en malvarma Antarktiko. Ne. Ŝi bezonas nur la koron. Ĝi estu granda-granda. Kaj ĝi batu same forte, same subtile, same fidele.

... Ili ne ekamis unu la alian ĉe l'unua rigardo. Tio venis nerimarkite. Ili kune kreskis, kune lernis en la lernejo. Sur la sama benko kun ŝi Andreo ne volis sidi ; por neniuj trezoroj. Ili sidis en diversaj anguloj de la klaso, sed iris en la lernejon kune. Kune ili ludis. Oni ilin moknomis gefianĉoj. En ilia korto knabinoj amikis kun knaboj, kaj kiam dum maloftaj neĝaj tagoj oni ludis militon kontraŭ la knaboj el najbara korto, la knabinoj preparis neĝbulojn. Unu tagon Andreo trafis en malamikan ringon. Retiriĝante kun pafoj, li atingis sian pordon, sed la malamikoj persekutis lin laŭspure. Kaj Zinjo, malviva pro timo, ĵetis pezan glacieron en la lampon subplanke. Aŭdiĝis surdiga tondro, tintante laŭte, falis pluvo da splitoj, kaj poste subite iĝis silento kaj mallumo. Andreo sukcesis malaperi.

(*) Elparolu : M o d.

Kelkiam ili kune preparis hejman taskon. Zinjo faris ĉion rapideme kaj malakurate, facile solvis komplikajn matematikaĵojn, mokante malrapideman Andreon. Kaj li ŝatis ĉion fari solide kaj fundamente, en liaj kajeroj, plenigitaj per rektaj linioj de lia ronda skribmaniero, mankis forstrekaĵoj, kaj paŭzoj. Fininte la taskojn, ili grimpis sur la grandan kanapon ĉe la fenestro kaj malfermis la antikvan geografian atlason. Ili vojaĝis pasie kaj ravite. Trankvila malrapidema Andreo flamiĝis. Ili konstruis eksterordinarajn ŝipojn, subakvajn boatojn, piede krucis meridianojn kaj paralelojn. Ĉiuj romanoj de Jules Verne, Jack London, Kaverin, Kazancev interplektiĝis en iliaj revoj. Kaj jen foje, navigante al la Suda Poluso ili malkovris la Landon de reĝino Maud. Tiel naskiĝis la fabelo.

La amo enradikiĝis en ili nerimarkite. Ili tiam jam finis la lernejon kaj intervidiĝis malofte. Zinjo lernis en la kurso de medicinaj flegistinoj, Andreo forlasis navigacian lernejon. Ili renkontiĝis ĉe la parka heĝo vespere antaŭ la Nova Jaro. Iĝis klare, ke ili bezonis la renkonton, ke ĉiu el ili sentas mankon de la alia. Ili ne iris al novjara festeno, sed la tutan varman Nigramaran novjaran nokton promenis en la urbo. Ili ion diris, sed ne rememorus, kion. Kaj tio eĉ ne gravis.

Sub la piedoj degelis neĝo. De la maro blovis varma vento. Senvestaj malhelaj akacioj balanciĝis en la vento. Li kisis ŝin unuafoje en la bulvardo, kaj vento forskuis sur ilin aron da akveroj de interplektitaj brancoj. Ili kuris, ridante, mano en mano, kaj la vento kuris por atingi ilin.

— Mia kapo estas tute malseka, — ridante diris Zinjo.

Ili enkuris iun pordegon. La urbo estis plena je muziko, ĉi nokte. Ĝi estis svingata el ĉiuj pordoj : gramofono, radioakceptiloj, pianoj... Aŭdiĝis kantado kaj rido. Ili staris, ĉirkaŭpreninte unu la alian, en la enirejo. Ial estis mallumo.

— Ĉu vi memoras ? Same, kiel tiam, — diris Zinjo.

Kiam ĉio iĝis tiel malbona kaj Zinjo konsideris la eventojn unu post la alia, ŝi rememoris en ĉiuj detaloj la novjaran nokton. Kiel bona ĉio estis ! Ili tiom bezonis unu la alian. Pasis multe da tempo, antaŭ ol ili komprenis : ili aliiĝis, ili ne havas pri kio paroli, pensas pri diversaj aĵoj, ne kapablas gardi unu la alian...

Kvazaŭ neniam estus la malproksimaj jaroj de la lernejo, la multaj tagoj, pasigitaj kune. Kvazaŭ ili ne revis, ĉirkaŭpreninte unu la alian, sur la kanapo, pri foraj landoj kaj heroaĵoj. Foje ŝajnis al Zinjo ke ŝi estas kulpa, ke necesis agi alimaniere, sed ŝi ne povis kompreni, kio ĝuste necesas.

— Ĉu vi memoras la Landon de reĝino Maud ? — per falinta voĉo demandis Zinjo, penante savi almenaŭ ion.

— Vi estas stranga, — respondis Andreo. — Ni ja estas plenaĝaj homoj.

Andreo bone lernis. Somere de la jaro li foriris al navigado. Kaj Zinjo finis la kurson. Ŝi estis sendota al granda fora konstruo. Ŝi ploris, petis permeson resti en la urbo, sed la prezidanto de l'distribua komisiono, grizhara homo kun laca vizaĝo, respondis al ŝi malvarme :

— Se vi ne volas tie labori, estas via afero. Sed du jarojn labori laŭ kondiĉo vi devas.

— La dekkvinan de aŭgusto Zinjo devis jam aperi ĉe ŝia laborloko, sed Andreo ne revenis. Ŝi prokrastis sian elveturon, riskante havi gravajn malagrablaĵojn. Elĉerpiĝis ŝia mono. Ŝi kaŝis sin de l'konatoj, timante demandojn.

Andreo venis nur je fino de aŭgusto. Plorante, Zinjo rakontis al li pri siaj aferoj. Andreo sidis malserene ĉe la fenestro. Li komprenis, kion ŝi atendas. Li devis diri la lastan vorton. Li igis sin kompreni, kio ĝuste okazis. Li tiom amis ŝin, kaj jen nenio estas, nur indiferento.

Andreĉjo ! Kio okazis al vi ? vi estas tute alia ! — ekĝemis Zinjo, alpaŝinte lin. Kaj ekploris ankoraŭ pli forte, komprenite, ke ŝi atendis vane.

Kaj Andreo pensis pri tio, ke oni fidis al li difini la kurson de l'ŝipo, kaj pri ŝtormo, kiu okazis dum lia deĵoro, kaj pri tio, kiel li revis rakonti ĉion al Zinjo, revenonte bordon. Ŝi renkontis lin en larmoj, malbela, malfeliĉa. Iu malbona sento simila al abomeno kreskis en li.

— Vi iĝis fremda al mi, — ploris Zinjo. — Sed vi ja diris, ke vi ĉiam amos min. Kiom multe vi promesis, Andreĉjo ! Kial do vi diris tion ?

Kion li povis respondi ?

— Jen, Zinaida, — diris Andreo, ekstare. — Mi jam ne amas vin. Mi ne scias, kial. Oni ne povas trudi la amon.

— Andreĉjo, — diris Zinjo, — Eble mi vin ofendis iel ? Eble io estis ne kiel vi volis ? Diru al mi, Andreĉjo ! — Ŝi ne povis paroli pro larmoj.

— Mi ne plu havas, kion diri, — respondis al ŝi Andreo.

Zinjo rigardis lin, kaj la rompita fiero ensplitiĝis ŝian koron. Trafulmis la penso : kiel malbone aspektis la sceno dum la distribuo, kia honto ! Kaj li kaŭzis ĉion !... Sed ĝi jam havis nenian signifon.

— Ĝis revido, Andreo, — diris Zinjo firme.

Li foriris, sed lia animo estis ankaŭ maltrankvila. Kaj Zinjo volis ĵeti ion terure ofendan al li postsekven, kvazaŭ ŝtonon, sed ŝi retenis sin, pensante nur : « Kial do ! Ĉu li kulpas, se li ĉesis ami ? Vere, amon oni ne trudas. Estas mia kulpo », kaj la koro doloris broge.

(daŭrigota).

LA FLORO DE LA PASTRO TOMASO

La pastro Tomaso estis malriĉa vilaĝa « zorganto de animoj » en la tempo de la « turka mondo » en Hungario. La trankvila vilaĝeto estis nomata : Csengele/Ĉengele/, kie li vivadis amante Dion kaj la homojn. Liaj adeptoj estis malriĉegaj kamparuloj, liajn trezorojn enviis nek la turko nek la germano, la vilaĝo povis vivadi en paco. Preter la malgrandaj domoj, kaŝitaj en la akaciaj arbaroj ofte rajdis la bejo de Szeged/Seged/ dum sia militvagado, sed li ne atentis pri ili.

Cetere ĉi tiu bejo de Szeged ne estis trezoravara homo. Sed tiutempe novaĵo estis la tulipo en Hungario ; pro ĝi li frenezis. Oro estis tiam la prezo de la bulbo de ĉi tiu floro kaj la potencaj turkaj sinjoroj ne pro tio konkuradis unu kun la aliaj : kiu havas pli ornaman glavon, pli belan ĉevalon, pli rapidan falkon, sed kiu havas pli be legan tulipon.

La bejo de Szeged havis multajn el ĝi. Ĉiuspecaj tulipoj, kiujn oni konis en tiu tempo, pompadis en lia ĝardeno. Inter ili estis ruĝaj, flavaj, violaj, nigraj, diverskoloraj, striaj, aliaj havis la formon de stelo, de sonorilego, de turbano, de krono kun frangoj aŭ galonoj.

Eĉ en la ĝardeno de Dio ne estas pluraj tulipoj, kiel en la mia — kutimis fanfaroni la bejo — kiam li promenadis en la tuliparbaro kun siaj gastoj.

Vere vane vojaĝadis liaj komercistoj en la holandaj tulipĝardenoj, sur la bordoj de la varmaj maroj, en la sovaĝaj arbaroj de la rokhavaj montsuproj, ili ne povis trovi novspecan tulipon. Kaj jen, subite portas la sciigon la soldataĉoj al la bejo, ke ekzistas en la mondo tia tulipo, kian li ankoraŭ ne vidis.

— Trans la maroj ? demandis la bejo.

— Tute ne ; ĉi tie proksime en Csengele.

— En la ĝardeno de kiu ?

En la ĝardeno de Dio, mia sinjora moŝto. La pastro de Csengele kulturas ĝin sur la tombo de sia patrino. Mondiranta homo estas tiu pastro, li akiris sian sciencon en la altlernejoj de fremdaj landoj ; ankaŭ sian floron li portis de tie. Ĝia koloro estas blanka, kiel la freŝa neĝo, ĝia floro estas plena, kiel la peonio.

— Multe vi babilaĉas — mansignas kolere la bejo. Matene estu ĉi tie kun la floro de Csengele. Vi povas aĉeti ĝin por unu monujo plena de oro.

Ankoraŭ la saman vesperon forrajdis la soldataĉoj kaj matene ili anoncis al la bejo, ke la floro de Csengele ne estas vendebla ; la pastro Tomaso diris, ke eĉ la turka imperiestro ne havas tiom da trezoro, pro kio li senhavigus la tombon de sia patrino disde la floro.

— Venigu la pastron Tomaso al mi — diris la bejo kaj kolerege ekbatis perskurĝe siajn subulojn.

La aĉuloj galopis rapidege al Csengele, sed pli rapidege ili regalopis. Pastro Tomaso ribeligis siajn fidelulojn, per glavo kaj falĉilo ili defendis la tombejon de la vilaĝo.

— Ŝtono ne restu sur ŝtono en tiu vilaĝo — furiozis kolegere la bejo kaj nun li sendis veran armeon kontraŭ la pastro Tomaso. Ili plenumis la ordonon ĝisfunde. La vilaĝo estis detruita, la vilaĝanoj rifuĝis ĉiudirekten kaj la turkoj kun granda triumfo portis la tulipon de Csengele. Ĝi estis plena, kiel la peonio, sed kelkloke sur ĝia neĝblanka petalo brulis ruĝaj makuloj.

— Kio estas ĉi tio ? — rigardis ilin teruriĝante la bejo.

Oni diris al li, ke la sango de la mano de la pastro Tomaso falis sur la floron. La bejo forviŝis per sia silka kaftano la ruĝajn makulojn kaj portis la floron en sian ĝardenon, sur la insulon Cseperke/Ĉeperke/. Li metis la floron en ĉeflokon, ke ĝi povu reĝe rigardi de tie la aliajn.

— Ĝi estu inter ili la paŝao — diris li al la ĝardenisto — gardu ĝin, ĉar per via kapo vi respondas pri la « paŝa-floro ». La ĝardenisto tre bone sciis, ke la bejo ne ŝercas kaj la tutan nokton li gardis la floron. Tie laboris li jam diligente, kiam la sekvantan tagon frumatene la bejo promenadis sur la insulo.

— Kion vi faras ĉi tie — estis la unua parolo de la bejo.

— Mi forviŝas la ruĝajn makulojn de sur la paŝao de la floroj — mia gransinjora moŝto ! Ĵetiĝis visaĝalteren ektimante la ĝardenisto.

— Sed pli ekteruriĝis la potenca sinjoro, ol sia ĝardenisto. Lia visaĝo paliĝis kiel la vakso, kiam li ekrigardis la tulipon de Csengele. Vere tie brulis la sangmakuloj sur la petalo, kiel la rubeno.

La purigado estis tute senutila. La bejo mem ne aŭdacis tuŝi ĝin, sed kriis al la ĝardenisto.

— Deŝiru tiun malbenatan flloron !

La ĝardenisto deŝiris la floron, sed la sekvantan tagon novaj burĝonoj dehiskis : sangruĝajn burĝonojn havis la blanka floro. La trian tagon kunkreskis ĝiaj mallarĝaj folioj, kiel la fingroj de la mano kaj ili sajnis kiel manplato malfermita. La kvaran tagon la bejo forlasis la fortikaĵon de Szeged, lasante tie sian tutan trezoron kaj rifuĝis de tia lando, kie eĉ la tero revenĝas siajn filojn.

La vento disportadis la granojn de la detruita ĝardeno ĉien kaj ĉi tiel disvastiĝis en la tuta lando la « paŝa-rozo ». En la ĉirkaŭaĵo de Csengele ankaŭ hodiaŭ ĝia nomo estas : « la pastro-floro ».

M. Ferenc.
El la hungara :
D-ro I. Nagy

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Du malgrandaj nombroj

La diferenco de la du nombroj estas 23.

La proporcio de la ciferoj de la dekoj estante de 2 al 3, tiuj ciferoj povas esti nur : 2 kaj 3, aŭ 4 kaj 6, aŭ 6 kaj 9. Se tiuj ciferoj estus 2 kaj 3, tiam la plej granda ebla diferenco inter la du nombroj estus

39 — 20 = 19

Tiu diferenco ne povas esti 23, kaj la ciferoj 2 kaj 3 ne konvenas por la dekoj.

6 kaj 9 ankaŭ ne konvenas, ĉar la ciferoj de la unuoj ne povas esti la duoblo de ili kiel postulas la punkto 3.

Restas do nur 4 kaj 6. Se oni kalkulas la ciferojn de la unuoj laŭ la proponita en la punkto 3, oni atingas

68 por unu el la nombroj
kaj 68 — 23 = 45 por la alia.

Trovu la nombron 100

1) $\frac{999}{9} = 100$


2) 45 + 9 + 8 + 30 + 7 + 1 = 100

La mistera cifero

$$\begin{array}{r} 1\,2\,3\,4\,5\,6\,7\,8\,9 \\ 9\,8\,7\,6\,5\,4\,3\,2\,1 \\ 1\,2\,3\,4\,5\,6\,7\,8\,9 \\ 9\,8\,7\,6\,5\,4\,3\,2\,1 \\ \qquad\qquad\qquad\qquad 2 \\ \hline 2\,2\,2\,2\,2\,2\,2\,2\,2\,2 \end{array}$$

NOVA PROBLEMO

Krucvort-Enigmo



(R) = nur radiko

Horizontale

1) Senorda konfuzo (R) ; Stadio (R) ;
2) Iskia neŭralgio
3) Malpliiga sufikso (R) ; Papago (R) ; Prefikso
4) Posteularo (R) ; Taĉmento da soldatoj (R)
5) Bela floro (R) ; Dentoskrapa malutila besteto (R)
6) Fantazia imagaĵo (R) ; Japana poemeto (R)
7) Verba finaĵo ; Maldika intesta parto (R) ; Ag sufikso (R)
8) Scienco pri riĉaĵoj
9) Ligotubero ; En ludkarto

Vertikale

a) Nerekta demanda pronomo ; Ekstera aspekto de iu aŭ io (R)
b) Steletforma signo
c) Numeralo ; devizo (R) ; Lirika poemo (R)
d) Poseda adjektivo ; Rilatas al virino
e) Amaso ; Instrumento
f) Malgranda ; inklina
g) Du trionoj de montra pronomo (R) ; Maceru tekseblan planton ; Verba finaĵo
h) Poemeto
i) Poeziverkisto (R) ; Faroj

GRAMATIKO PER BONHUMORO

KUNMETITAJ ADJEKTIVOJ

Oni povas ilin formi per kunmetado de diversaj radikoj.

La lasta radiko povas esti Adjektiva : plenforta, ĉielblua, prespreta.

Aŭ substantiva : urbodoma, bluokula, interakta, rozkolora.

Ni komparu : pajla ĉapelo (el pajlo) ; pajlokolora ĉapelo.

Aŭ verba : bonfarta, fruktodona, postmorta, denaska.

Aŭ prepozitiva ; aŭ adverba : senpera, porĉiama.

Konservo de **A-finaĵo** por belsoneco.

Kurbakrura, dubasenca, longapenta.

Inter pluraj adjektivoj rilatantaj al la sama substantivo, oni uzas streketon :

(ira-reira bileto) (ruĝa-blua-blanka standardo).

Niaj mirigaj infanoj !



Ne miru, mia kara panjo, mi certigas al vi, ke, samtempe kaj plenprofite, mi povas legi kaj rigardi la televidon ; cetere, de mia naskiĝo, vi ripetas al viaj geamikoj, ke mi estas multtalenta !

Neĝojiga programo



De nun ni devas komenci pli taŭgan severmoran vivmanieron. Jen nia lasta manĝegado ; tuj de morgaŭ ni observos severan dieton kaj dufoje ĉiusemajne respektos absolutan dieton.



Libertempaj plezuroj



Finfine ! Feliĉe por mi, li ne plu plendos pri la senutilaj libertempaj elspezoj !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Radu Pàtrascu, str. Pompiliu Manoliu 13 Bl. G2 ap. 75-7000 Bukareŝto-39.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, n° 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1977, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

La semaine de printemps va bientôt commencer. Il y a quinze jours, elle s'annonçait médiocre. Elle va, en fait, être bonne. En effet, aux quelques quarante inscrits, jeunes et adultes, de la période viendront s'ajouter, en fin de semaine, une cinquantaine d'espérantistes italiens. Cela n'est pas sans poser des problèmes, car les travaux d'aménagement de cinq chambres ne seront pas totalement terminés. D'autre part, les inscriptions tardives nous obligent à faire face brutalement à une organisation qui, jusqu'alors ne semblait pas nécessaire.

Pour l'été, les inscriptions arrivent régulièrement et, déjà, pour la première période, le nombre de places libres est extrêmement réduit. Pour la deuxième et la troisième périodes, il reste encore des chambres libres. La deuxième période présentera un intérêt particulier car, outre le cours personnalisé déjà annoncé en ce qui concerne la pratique de la langue, le cours du premier degré se déroulera selon la méthode Cseh et sera dirigé par S-ino Childs-Mee, spécialiste de l'enseignement des langues.

L'Assemblée générale, dont le compte rendu sera joint à ce numéro, aura à connaître des résultats financiers de l'année 1976. Ils sont bons, semblables à ceux de 1975. Ils permettent de faire les aménagements prévus.

Pour l'instant, avant l'arrivée des stagiaires de la semaine de printemps, une équipe de volontaires peint et tapisse, gratte et frotte. Gros travail fait dans la bonne humeur, qui permet de faire plus avec les mêmes moyens, et aussi travail d'équipe, le seul qui permet à Grésillon de vivre.

P. BABIN.

LA REVUE

C'est une tradition, maintenant, de demander, dans chaque numéro, que le règlement de l'abonnement en cours soit effectué assez vite ; à plus forte raison, l'abonnement de l'année passée, pour les quelques retardataires. Donc, cette fois encore, nous lançons le même appel en vous encourageant à faire abonner vos amis. Merci.

ABONNES BIENFAITEURS 1976 (suite)

R. Buerick (62)	30,00
A. Tailpied (14)	30,00
G. Chaumereuil (75)	45,00
L. Ricklin (75)	30,00
M.-L. Grisier (03)	30,00
R. Coupeau (72)	30,00
S. Fort (56)	30,00
L. Robert (33)	30,00
A. Contart (62)	30,00
G. Prigent (84)	30,00
R. Mauchien (80)	30,00
H. Coulon (25)	30,00
J. Lezan (24)	30,00
A. Bongars (37)	30,00
Total	**435,00**

ABONNES BIENFAITEURS 1977 (suite)

A. Lherbier (72)	30,00
L. Pellerin (49)	30,00
M. Coussé (72)	30,00
R. Gérard (75)	30,00
Th. Micard (53)	60,00
R. Tragin (27)	30,00
L. Bidet (03)	30,00
A.-M. Roy (71)	30,00
G. Lemonnier (92)	50,00
R. Canet (89)	30,00
A. Kristos (63)	30,00
P. Turbellier (44)	30,00
R. Bruguier (30)	30,00
M.Sueur (62)	30,00
J.-J. Loiseau (56)	30,00
J. Claitte (69)	30,00
R. Martin (35)	30,00
L. Garcia (66)	30,00
E. Gallon (69)	30,00
B. Clavier (69)	30,00
C. Pral (69)	30,00
R. Quillaud (44)	30,00
P. Lemarchand (76)	30,00
F. Trépier (74)	30,00
J. Dérédec (56)	30,00
J. Bailly (89)	30,00
J. Imbert (37)	30,00
J. Amouroux (66)	50,00
C. Cantel (17)	30,00
D. Bourgeois (Suisse)	50,00
J. Schrapp (All. féd.)	30,00
E. Mak Edery (06)	40,00
S. Guillou (22)	30,00
Th. Farjon (06)	30,00
C.C.E. Marseille (13)	30,00
E. Schertzer (67)	30,00
S. Rocca (67)	30,00
J. Thiébaud (70)	30,00
A. Fauvel (22)	50,00
G. Massé (73)	30,00
A. Bois (35)	30,00
J. Philippeau (44)	60,00
R. Devendeville (59)	30,00
M. Diard (49)	30,00
Y. Lucas (76)	30,00
F. Schurard (All. féd.)	45,00
J. Lezan (24)	30,00
Y. Kerlouedan (36)	30,00
F. Duqueyroux (36)	30,00
J. Futran (U.S.A.)	40,00
R. Marmou (77)	30,00
M. Reynaud (84)	30,00
S. Reynaud (84)	30,00
A. Thierriat (75)	30,00
S. Amariglio (92)	30,00
H. Ferez (06)	30,00
R. Rion (76)	30,00
Ch. Moreau (06)	30,00
A. Raulet (44)	30,00
F. Sol (33)	30,00
F. Lo Jacomo (75)	30,00
Esp. Grupo Romans (26)	30,00
M.-L. Boinier (91)	30,00
J. Vazon (79)	30,00
Ch. Bertin (35)	30,00
J. Bailly (89)	30,00
R. Mauchien (80)	30,00
A. Stutzman (68)	30,00
A. Hervouet (92)	30,00
R. Durand (88)	30,00
R. Hénaux (92)	30,00
G. Martinez (16)	50,00
Total	**2.355,00**

NOS PEINES

C est avec stupeur que nous avons appris le décès, dans sa 55e année, de Mme Guérout, du Perreux-sur-Marne.

A son mari, Pierre Guérout ; à sa belle-sœur, Yvonne Guérout ; et à leur famille, nous adressons notre amicale sympathie.

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE DU 3 AVRIL 1977

L'assemblée, comptant 221 membres présents ou représentés, le quorum est largement dépassé. M. Boyet est élu comme président de séance.

L'étude du compte d'exploitation fait apparaître une nette augmentation des recettes correspondant aux séjours, ainsi que des ventes de tickets et de souvenirs. Cette augmentation est due bien sûr à l'augmentation du prix de séjour, mais surtout au nombre et à la durée de ces séjours. Côté dépenses, les salaires et les charges sociales sont en hausse, ce qui vient de la réévaluation du S.M.I.C. sur lequel sont calculés les salaires, et de la liquidation d'anciens comptes concernant les retraites complémentaires. Il semble souhaitable à l'assemblée générale de connaître à l'avenir la rentrée moyenne d'argent par journée de séjour à Grésillon.

A la suite de la lettre d'un sociétaire, il apparaît nécessaire de réévaluer les immobilisations concernant le terrain, de manière à les amener à la valeur actuelle, et non plus à leur valeur d'achat, comme c'était jusqu'à présent le cas. Cette augmentation pourrait être compensée par une réévaluation des parts de sociétaire.

Il serait également souhaitable d'augmenter les immobilisations de la valeur des travaux bénévoles effectués dans le château ; cette augmentation serait équilibrée dans le bilan par une somme équivalente qui serait portée en don. Ceci permettrait de rapprocher la valeur des immobilisations de la valeur réelle afin de ne pas arriver à terme à une valeur des amortissements égale ou supérieure à celle des immobilisations.

L'assemblée générale adopte le rapport financier à l'unanimité.

L'assemblée générale note le départ de cinq sociétaires et le remboursement de six parts, et l'arrivée de vingt-six sociétaires nouveaux pour 41 parts, ainsi que la souscription de 64 nouvelles parts d'anciens sociétaires.

MM. Berthelot et Prévot sont renouvelés dans leur fonction de commissaires aux comptes.

Les stages 1977 s'annoncent bien. Pour Pâques, une cinquantaine de personnes sont attendues, et un passage d'Italiens portera les effectifs à une centaine pendant quelques jours. Les week-ends de mai et de juin sont d'ores et déjà occupés par divers groupes. Pour les stages d'été, on note un rythme d'inscription rapide. Pour les semaines internationales, 70 personnes sont déjà inscrites, et environ une trentaine pour chacun des autres stages.

L'attention des sociétaires est attirée sur le fait que l'année prochaine le mandat de la moitié des membres du conseil d'administration arrive à expiration. Les candidats à ces postes sont priés de se faire connaître.

L'année 1977 marque le 25e anniversaire du fonctionnement de Grésillon. L'assemblée générale décide de commémorer cet anniversaire lors de chacun des stages d'été avec invitation de la presse lors des semaines internationales.

Divers travaux ont été exécutés dans le château. De nouvelles douches sont prêtes à fonctionner au premier étage. Le couloir menant vers le deuxième étage a été refait, ainsi que des chambres. La finition a été assurée par des volontaires que l'assemblée générale remercie bien vivement. On note également la plantation de nombreux arbres dans le parc.

R. JELENC.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de colection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.
Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE

...aujourd'hui

Quelques livres d'Edmond Privat

Vivo de Zamenhof (10 frs)
Aventuroj de pioniro (12 frs)
Junaĝa verkaro (10 frs)
Karlo (3,50 frs)
Vivo de Gandhi (12 frs)